

RETKOMUNIKOJ 1/2010

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonajn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

1. Muzea nokto en Svitavy kun eblo de tranokto
2. Novaj ekspozicioj pri Esperanto
3. La 5-a Sabla Printempo
4. Grand Biblio pri Kurisu Kei
5. Internacia virina tago en Hiroŝimo
6. Ĉeĥa Esperanto-junularo aktivas (oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)
7. Kalendaro de Esperanto-aranĝoj en Ĉeĥio kaj organizitaj de Ĉeĥio

1. MUZEA NOKTO EN SVITAVY KUN EBLO DE TRANOKTO

Kiel jam anoncote, la 12-an de junio okazos en Svitavy Muzea nokto, al kies programo kontribuos ankaŭ la Esperanto muzeo. Ĝia programo estos riĉa: je la 16-a horo ĝi komenciĝos per Inaŭguro de la nova ekspozicio en la muzeo, ĉi-foje el la verko de Pavel Rak, humoristo kaj ilustristo, fama ankaŭ en Esperantujo. Ĝin sekvos bapto de la lernolibro de Stano Marček „Esperanto přímou metodou“, la fama lernolibro, kiu jam aperis en 24 lingvoj. Ĝin partoprenos kaj la aŭtoro, kaj ilustristino Linda Marčeková, kaj la tradukisto ĉeĥen Max Kašparů. Baptopatrino fariĝos Jana Melichárková, ĈEA-prezidantino kaj aŭtorino de duvoluma lernolibro de Esperanto por infanoj. Memkomprene sekvos autografado de ĉiuj nomitaj, inkluzive de Pavel Rak, kiu subskribados sian verkon „Desegnita humuro“. La lasta programero celas infanojn kaj nomiĝas „Desegnado de infanoj kun Pavel Rak“. Dum ĝi li volonte ne nur malkaŝos al la infanoj la sekreton de sia arto, sed ankaŭ

desegnigos ilin, kion li jam plurfoje sukcesis aliloke. Krome, interesa kultura kaj amuza programo okazos dum la tuta vespero en areo de la Urba muzeo kaj galerio tuj vid-al-vide de la Esperanto-muzeo.

ATENTU: eblas mendi tre favore prete tranokton en studenta hejmo, nur 200.-Kč/persono, kio certe faciligos la partoprenon de esperantistoj el pli granda distanco. Interesatoj bonvolu anonci vin ĉe Libuše Dvořáková, dvor.libuse@seznam.cz

2. NOVAJ EKSPOZICIOJ PRI ESPERANTO

EN PÍSEK okazos ekspozicio pri Esperanto ekde 15.3. ĝis 14.4. en la Urba biblioteko en Písek (Alšovo nám. 85). Entute 23 paneloj A1-formataj kaj 3 librovitrinoj respegulos viglamaniere variecon de nunaj utiligeblecoj de Esperanto. Estas planate plu pruntedoni la materialon al aliaj interesitaj urboj. (Jam nun esprimis intereson České Budějovice, Tábor, Milevsko kaj Klatovy!). La ekspozicio troviĝas en koridoro de la 1-a etaĝo kaj estas libere alirebla dum labortagoj (krom ĵaŭdo) ekde 9 ĝis 18h kaj sabate ekde 9 ĝis 12h. Marde 13.4. ekde 16:30 en la klubejo de la biblioteko okazos ĉeĥlingva programo por publiko ESPERANTO KAJ (NE NUR) LITERATURO. Invitas vin aŭtorino de la ekspozicio Pavla Dvořáková kaj la loka E-klubo. Vian viziton vi povas anonci aŭ pli da informoj ricevi ĉe: pisek@esperanto.cz

EN KAJ ĈE MORAVSKÉ BUDĚJOVICE okazos eĉ tri ekspozicioj: „Ĉu Esperanto peros Otokar Březina al aliaj nacioj?“ en Muzeo de Otokar Březina (Březinova 46) en Jaroměřice nad Rokytnou. Ĝi daŭros la tutan sezonon de aprilo ĝis oktobro. La dua, ankaŭ en Jaroměřice nad Rokytnou, sed en bibliotelo (OD Rokytná) estos tiu, kiu pasintjare estis en Moravské Budějovice: „Hono al Komenio aŭ kiel ni interkomunikos ene de EU“. Ĝi estos vizitebla de la 6-a ĝis la 30-a de aprilo ĉiam lunde, merkrede kaj vendrede. Kaj la tria „Ĉu nesufiĉus unu lingvo?“ okazos en Muzeo de metioj en Moravské Budějovice ekde la 30-a de aprilo ĝis la 23-a de majo. Ĝi estos parto de la ekspozicio „Sankta Klement Maria Hofbauer (Dvořák) kaj lia mesaĝo por ni“. Pliajn informojn pri ĉiuj ĉi vi povas ricevi ĉe ilia iniciatinto kaj aŭtoro Viktor Dvořák, dvorakovi.mb@volny.cz.

3. LA 5-A SABLA PRINTEMPO

okazos 9.-11.4. en Písek. Internacia seminario „Esperanto en Interreto“ traktos krom aktualaĵoj temojn „Mallongaj E-videofilmoj“ (subtekstigado kaj aldono de voĉa komentario) „Elektronika antologio de ĈEA en la internacia datumbazo „BRETARO“ kaj „Funkciigo de la nova komuna retpaĝaro de ĈEA kaj ĈEJ“. Taŭga ankaŭ por averaĝaj komputiluzantoj! Instruado en la ĉeĥa kaj en Esperanto. Aldone vizito de E-ekspozicio en la urba biblioteko, vespere projekciado de E-filmoj kaj muzikumado. Dank' al akirita subvencio finance avantaĝa partoprenkotizo (validas nur por aliĝintoj ĝis 28.3.!)! Venu por lerni, ĝui kaj helpi promocii Esperanton! Info: pisek@esperanto.cz

4. GRAND BIBLIO PRI KURISU KEI

Grand Biblio, belaspekta renoma periodaĵo de Nacia Biblioteko aperigos en la plej proksima numero aperonta la 30-an de marto omaĝan artikolon pri la japana bohemisto kaj esperantisto Kurisu Kei verkita de Petro Chrdle. Estas klare, ke skribante pri Kurisu Kei estas plurfoje meciita lia rilato al Esperanto kaj ankaŭ, ke li estas honora membro ne nur de Ĉeĥa-Japana Asocio, sed ankaŭ de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj de Universala Esperanto-Asocio. Por tiuj, kiuj ne konas la ĵurnalon ni aldonu, ke ĝi estas ricevebla senpage en ĉiuj ĉeĥaj bibliotekoj, tamen en iuj malgrandaj filioj nur kun sufiĉe granda prokrasto.

4. INTERNACIA VIRINA TAGO EN HIROŜIMO

Dum en Ĉeĥio la Internacia tago de virinoj estas konsiderata „komunisma festeno“ kaj do ignorata, en aliaj partoj de la mondo, kie oni neniukaze povas nomi tion „heredaĵo de komunismo“ oni ne nur festas ĝin, sed ie eĉ saĝe uzas ĝin por montri la utilecon de Esperanto. Brila ekzemplo de tio estas la iniciato de Taeko OSIOKA en Hiroŝimo. Ŝia raporto kun fotoj estas videbla ĉe: <http://www.ipernity.com/blog/32119/234640> Ni aldonu, ke al tiu sukcesa ekspozicio modeste kontribuis (kiel jam tradicie dum pluraj jaroj) eninter entute 7 leteroj venintaj el Ĉeĥio ankaŭ la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Asocio de handikapitaj esperantistoj kaj la eldonejo KAVA-PECH.

5. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) prepariĝas por festi 5-an datrevenon de

sia fondiĝo. La 16-an de majo en Kralupy nad Vltavou oni solene rememoros registriĝon de la organizo, la 20-an de junio ĉe ĉeĥa-pola landlimo sur Ĉantorio la fonda kunvenon. Kompiliĝas kolekto de fotoj kaj raportoj pri pasinta agado kaj filmo pri la IJK en Liberec'.

Novan novjaran renkontiĝon JES en pola Zakopane partoprenis 9 membroj. Januare 6 ĈEJ-anoj kaj Martin SAWITZKI (DE) ĉeestis ĈEA-seminaron en Svitavy. En Prago la 7-an de februaro okazis promeno "Kun kuniklo al Prokop", la 28-an ĈEJ-anoj ĉeestis kunvenon de E-mentál. En Brno januare gastis Petr Adam DOHNÁLEK, 24-an de februaro la klubon vizitis Salomé HUG (FR), Cesáreo GARCÍA FERNÁNDEZ (ES) kaj Michal MATÚŠOV (SK), komence de marto Nico HUURMAN (NL).

Mirek HRUŠKA vojaĝis al Varsovio kaj Bydgoszcz, Marek BLAHUŠ vizitis esperantistojn en Nancio kaj Bratislavo. Okaze de la Zamenhofa tago aperigis Dan MRÁZEK intervjuon kun kantisto JoMo en Ĉeĥa Radio 2 Praha. Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://cej.esperanto.cz/>

KALENDARO DE E-ARANĜOJ EN ĈEĤIO KAJ ORGANIZITAJ DE ĈEĤIO

En venonta numero de ĈEA-retkomunikoj (espereble baldaŭ) ni aperigos denove la kalendaron de Esperanto-renkontiĝoj. Bonvolu ne forgesi sendi informon pri la aranĝo, kiun vi planas organizi (Nomo de la aranĝo, dato, loko, retadreso kie eblas ricevi pluajn informojn kaj aliĝilojn) al la retadreso: chrdle@kava-pech.cz. De vi organizantoj dependas, ĉu la kalendaro estos kompleta!

Atentu, ke en la kalendaro estas envicigitaj nur la eventoj, kiuj okazas en Ĉeĥio, aŭ kiuj estas organizataj el Ĉeĥio. Eksterlandajn eventojn vi serĉu plej bone ĉe <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>